2-a Jaro, N-o 41 (93) APERAS S.A.T. SEMAJNE 8. Julio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redakcio: 14, avenue de Corbéra Paris XII	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

BELGIO, LANDO DE L' DEMOKRATIO

(SPECIALE VERKITA POR "SENN." DE *J. BRACOPS)*

Same kiel la grandaj eŭropaj ŝtatoj, kiuj baraktas kontraŭ malfacilaĵojn grandegajn deveñintaj de la milito, eta Belgio, "martirigita Belgio", kiu havis sian gloran horon dum la sanga konflikto, konas nun siavice la angoregon de krizo, kiu anoncas sin tre grava!

De Novembro 1918, ĉesigo de la bataloj, la registaroj — kiuj ajn estis ilia politika koloro — zorge nutris, kiel la franca "Nacia Bloko", tiun iluzion: "La germano pagos!"

Vivante sur tiu kimero, la ŝtato neniam uzis rimedojn por resanigi siajn financojn kaj nur limigis sian agadon je starigo de pruntoj kun proksima kaj kun malproksima pago.

Ĉu necesas memorigi, ke tiu stulta kredo je la financaj eblecoj de Germanio kooperigis Belgion al la militokupado de la Ruhr'. Tiele enkrustiĝis en ĉiuj tavoloj de la loĝantaro, je ĉiuj gradoj de la socia hierarkio, la espero je daŭra kaj paca disvolviĝo de la produktado kaj de l' komerco naciaj.

Tiu maniero solvi la malfacilaĵojn, ŝovante ilin en estonteco, kiun oni opiniis tre malproksima, estis nature favora al la socia paco. Pro tio ja estas, ke Belgio aspektis ĝis nun kiel la "elektita tero de l' socia paco", la Chanaan de la sendolora evolucio al pli bona estonto por ĉiuj sociklasoj.

Tiu situacio, tre favora al starigita "ordo", estis trovinta sian politikan esprimon en registaroj de klaskunlaborado. Kiel estis skribita antaŭe, en artikoloj pri la politika situacio en Belgio, la 3 grandaj partioj — klerikala, socialista kaj liberala — transformigis siajn respektivajn programojn en unuforma pasto, tiamaniere favorigante iun interpenetradon de la diversaj sociklasoj. Sur industria kampo, regis la perfekta agordo en la "egalpartaj komisioj", instituitaj per leĝa vojo!

En tiuj komitatoj sin renkontis egalparte la reprezentantoj laboristaj kaj mastraj, sub prezideco de iu registara delegito. Tuj kiam okazis konflikto — pri la salajro aŭ la aplikado de la okhora labortago aŭ la laبororganizado — la koncerna "egalparta komisio" okupiĝis pri ĝi kaj klopodis, per reciprokaj cedoj, limigi la konflikton kaj ĝin envojigi sur paciga vojo. Plejofte, kompromiso estis akceptita kaj ŝajnis, ke tiuj komisionoj ĝuis je paciga povo nekomparebla. Kompreneble, la laboristoj, en la uzino aŭ ĉe la konstruejo, kiel la oficistoj kaj ŝtatfunkciuloj, havis ĉiam duonmalbonan salajron, ne proporciitaj kun la vivkosteco, kaj tiu ŝajna socia paco permesis al la burĝaro realigi dividendojn, pri kiuj la industriaj, financaj kaj komercaj bilancoj nur donas malgrandan ideon.

Siaflanke, la laboristaro, kiu sin nutras per surogatoj kiel frostigita viando kaj margarino — kies konsumado pligrandiĝis konsiderinde — ŝajnis vivi en profunda malvigleco, kiun sporto kaj kinematografo efike stimulis. Dume, en plena centro de la grandaj urboj, veraj palacoj de l' financo stariĝis kaj la bankoj aĉetis princajn posedaĵojn, por en ĝi organizi sian spekulacilaboron.

Tiu klasbatala interpaco, kies sereneco aspektis helega, estis fakte nur idilio, en kiu la proletaro faris ĉiujn cedojn al iu burĝaro, kies amo restis ĉiam nemateria. De tempo al tempo tia serena ĉielo estis krevata de la fulmo de iu granda striko aŭ de iu komunista komploto!

Aprilo 1925 alvenis, dato de la lastaj ĝeneralaj balotoj.

De 1921, la socialistoj estis forigitaj de la registaro kaj anstataŭitaj de koalicio nure burĝa (katolikaj kaj liberalaj), kiu opiniis la helpon socialistan ne plu necesa! Ĉi tiu estis opiniita nepre necesa, ĝis kiam la produktado de la lando, ruinigita de la

Grava Avizo! Niaj kunlaborantoj kaj legantoj bonvolu noti bone en la memoron, ke post la 15. Julio "SENNACIULO" estos presata en Paris kaj la sidejo de la Redakcio estos: 14, AVENUE DE CORBÉRA, PARIS (XIIe).

Rilate la Administracion, nenio estas ŝanĝita. Oni daŭrigu sendi la abonmonon kaj korespond-anoncojn al Leipzig; nur manuskriptojn oni sendu al Paris.

Ni decidis presigi niajn organojn en Paris pro la senvaloriĝo de la franko.

Aliaj malpli gravaj motivoj ankaŭ instigis nin, fari tiun ŝanĝon. EKZEKUTIVA KOMITATO DE SAT.

milito, ne restariĝis. Por tion realigi necesis la efikan helpon de la socialistoj kaj pro tio la burĝaro estis doninta demokrate al ili kelkajn "ministeriajn paperujojn"! Estis la epoko, dum kiu la socialistaj ministroj bridigis la strikojn kaj sendis ĝendarmojn por protekti la strikrompantojn. Spite tiun bonvolon la burĝaro forpelis la soc. ministrojn tuj kiam ĝia situacio sufiĉe refirmiĝis!

Tio daŭris ĝis Aprilo 1925! La socialistoj, kiuj havis 4 jarojn de parlamenta opozicio, prezentiĝis antaŭ la voĉdonantaro en kondiĉoj tre favoraj. Sub la reakcia registaro, la vivkosteco daŭre altiĝis, la franko ĉiam pluen falis kaj same la ŝtataj obligacioj!

Tiu deficita situacio favoris la opozicipartiojn, kiuj brile venkis en la balotado. La socialista voĉdonantaro pasis de 600 000 al 800 000, kiuj enirigis 78 deputitojn sur 187, el kiuj konsistas la parlamento. Siaflanke la kom., kiuj unuafoje serioze partoprenis la balotadon, rikoltis 30 000 voĉojn kaj pasigis 1 deputito, en Bruxelles kaj 1 en Liège.

En la ĉefurbo mem, la socialistoj fariĝis la ĉefa partio kaj tio ja ankaŭ estis signifoplena!

La kamparo ankaŭ, tiel malprogresema tamen, tiel submetita al la religia influo, plifortigis la progresivan movadon jam komencita en 1918, kaj, en multaj vilaĝoj la socialdemokratio sukcesis penetrigi sian politikan penson. Aliflanke, la katolika partio estis — ĝenerale — konservinta siajn poziciojn.

Tamen estis tiele nur surface. En realeco, tiu partio nur estis laŭnome unuigita! Spite la spirita ligilo, kiu unuigis ilin, la belgiaj katolikoj, kiel tiuj el ĉie, estis profunde dividitaj. En ilia partio najbaras pli malpli malamike la "Federacio de la Kluboj" ege konservativa, bastiono de la malnova tera aristokratio, kaj la "Kristan-Demokratoj", kiuj grupigas la laboristojn organizitaj en la kat. sindikatoj. Oni devas ankoraŭ aldoni la "kamparan-unuiĝojn", kiuj sin montras sufiĉe demokrataj! Tielaj subdividoj en iu partio estas pli disigaj ol unuigaj! Kaj, je la balotado de 5. Aprilo la demokrata frakcio de la katolika partio fortiĝis je la malprofito de la konservativa frakcio! La liberala partio, reprezentanto de la granda industrio, pagis kare sian reakcian politikon per la perdo de pluraj mandatoj kaj ĝia grupo, kiu ĉiam estis tre forta, reduktiĝis je 23 membroj sur 187! Por respondi al la verdikto de la voĉdonantaro, la socialistoj kun la kristandemokratoj, starigis demokratan registaron!

La socialistoj havis 5 ministrojn, inter kiuj Vandervelde por la eksterlandaj aferoj kaj Huysmans por la popola klerigado.

La aliajn ministeriojn okupis kristan-demokratoj kaj kelkaj senpartiaj ministroj.

S-ro Poullet, prezidanto de la registaro kaj notinda membro de la kristan-demokratio, direktis tiun registaron demokratintencan! Ĝi daŭris ĉirkaŭe 1 jaro, ĝuste la tempon necesan por manifesti sian nepotencon kaj kapitulacii antaŭ la konservativa malplejmulto de la parlamento apogita sur la monpotencoj.

Gravajn okazintaĵojn konis tiu registaro! La registaro, en konsento kun la militaj aŭtoritatoj, estinta malkreinta kelkajn regimentojn, oni vidis la registaran prezidanton insultata kaj naŭzata de la naciistoj, okaze de iu memoriga ceremonio!

Tiu registaro estis doninta al si celon: la financa stabiligo! (firmigo).

Dank' al grandaj financaj oferoj, la angla funto estis konservita je 107 fr. La financa ministro, Janssen, estis komencinta negocadojn en Londono kaj Nov-Jorko por konkludi prunton. Por malsukcesigi tiujn negocadojn la gazetaro kontraŭ-demokrata organizis presbatalon kontraŭ la registaro. Sekve la situacio fariĝis senespera kaj antaŭ kelkaj semajnoj, subite, sekve de la malsukceso de la negocadoj la funto altiĝis de 107 ĝis 170 fr.

La planoj pri la firmigo de la financoj estis ruinigitaj!

La konservativuloj kaj kelkaj etaj faŝistogrupoj postulis la dissolviĝon de la parlamento kaj la starigon de diktatora povo. Reakciaj mitingoj agitis la publikon kaj la franko kaj la ŝtataj valoroj de tago al tago malplivaloriĝis! Subite, kaj por "restarigi la fidon" la registaro Poullet, reprezentanto leĝa de granda plimulto de la lando, havante en la parlamento absolutan konfidon, estis devigata forlasi sian postenon por transdoni la potencon al la bankistoj! La belgaj laboristoj, ni pri tio ne dubu, scios profiti de tiu demokrata eksperimento kaj scios elekti aliajn pli efikajn armilojn ol la ĝenerala voĉdonrajto por batali por sia liberiĝo!

Post longaj traktadoj inter la partioj, iu registaro de "Nacia Unueco", — kun katolikaj, liberalaj, socialistaj, financistaj partoprenantoj — naskiĝis kaj metis sur sia programo tiun nuran punkton: financa firmigo! Spite la ĉeesto en la registaro de du bankistoj, Houtart kaj Francqui, simbolaj reprezentantoj de la financo, la franko rekomencis fali! Hodiaŭ, post reveno al 150 fr., la funto ree valoras 170 fr.! Konsekvence al tio la vivkosteco daŭre altiĝas. La pano kostas 2,45 fr. po kgr., kiam la meza salajro de iu laboristo estas 20 fr. potage, kaj ĉio kostas samproporcie!

Ĉiuj gazetoj skribas pri oferoj, elspezomalgrandigo, ktp. Dume, la burĝoj — laŭdire de la financaj ministroj mem — eksportas siajn kapitalojn, por ilin meti en asekuritan lokon!

La parlamento ĵus fulmrapide voĉdonis 1500 milionoj da novaj impostoj kaj tio nur estas komenceto!

La salajruloj el ĉi-lando havas malhelan estonton! Se ĝi volas vivi, ĝi devos batali kaj akre, por elaĉeti sian partoprenon en milito, kiu riĉigis nur tiujn, kiuj ĝin subpremas.

Jam kategoriaj avertoj estas donitaj! S-ro Houtart, unu el la nunaj ministroj kaj samtempe gvidanto de gravega banko, deklaris: "Estos necese, ke la sindikatestroj komprenigu al la laboristoj, ke ili devos trudi al si pezajn oferojn!"

Aprobante la "konvencio Wasghintona pri la 8-hora labortago" la parlamentanoj — ĉu soc. ĉu ne soc. — proklamis la necesecon por la laboristoj, akcepti la elastigon, la modifigon de la leĝo pri la 8 horoj!

Tiel, ĉenoj pli kaj pli pezaj prepariĝas por la belgia proletaro! Ĉi-lasta, feliĉe, ŝajnas eliĝi el sia demokrata dormado!

Sub influo de la reakciaj minacoj, la Belga Laborista Partio organizas, kiel en Aŭstrio kaj en Germanio, proletajn ŝirmligojn kontraŭ faŝistoj. En la tuta lando imponaj manifestadoj de laboristoj armitaj per bastonoj, okazas. Tiu organizado armita de la proletaro estas la plenpreciza denunco de la demokrata utopio kaj signas la deirpunkton de nova serio de bataloj kontraŭ la burĝaro! Tiele la proletaro sin edukas per la sperto kaj konstruas la fundamenton de la batalo, kiu donos al ĝi liberecon! Esperantigis *SAT-ano 155.*

Post plebiscito en Germanio

Konciza bildo pri la 20. Junio

La 20. Junio estis decidoplena tago. Dum ĝi okazis voĉdono, ĉu la malkuraĝe fugintaj eksreĝoj germanaj ricevu tion, kion ili postulas, valoraĵo, kiu sumiĝas proksimume 3 miliardojn. (Vidu ankaŭ "Senn." 21: "Aroganteco" de k-do Oŝo). 20 milionoj da voĉoj estis necesaj, por ke la leĝoprojekto popoldezirita pri senproprigo de la reĝaj posedaĵoj fariĝu leĝo. Spite bonefika propagando, spite komuna laboro de l' proletoj diverstendencaj, spite la plej streĉa aktiveco de la germ. proletaro la 20 milionoj ne kolektiĝis. Proksimume 15 milionoj decidis per "Jes", kio signifas por senproprigo. Sekve mankis ĉirkaŭ 5 milionoj.

Ĉu estas fiasko? Jes, kaj ne. Jes, ĉar multaj proletoj kaj vastaj proletiĝintaj amasoj jam ne ekkonis la signifon de tiu plebiscito kies venko estus doninta decidigan turnon al la proletara afero. La rezulto certe multe kuraĝigas la reakciajn monarkistojn. La "germanpopola sindonemo" certe instigos la reĝojn nun rapide preni ĉion kaj riski ĉion. La elkreskoj el tio estas facile imageblaj.

Aliflanke ni vidas la ne-fiaskon, ĉar tiu plebiscito montris denove la nepran neceson pli intime kaj intence kuniĝi kun ĉiuj ekspluatatoj. Kaj ĝi ne nur montras,

sed stimulas agi laŭ tio. Plue ni devas konsideri, ke la kontraŭularo per neimageblaj rimedoj teroris la voĉdonintojn. Multaj ne povis elekti, kvankam ili volonte volis. Ili ne paŝis al la elektejo, timante esti ekkonitaj kaj forpelitaj el laborejo.

Efektive en diversaj regionoj la "supraj sinjoroj" de la minejoj ktp. arogis noti en "nigran liston" la irantajn al elektejo laboristojn, procedo, kiun la proletoj ne toleris, elĵetante la koncernajn sinjorojn el la elektejo. Krome la eklezioj nigramaniere agitis kontraŭ ĉi-plebiscito, kaj ni ja konas la potencan influon elirantan el "nigrula buŝo". Tion oni devas konstati por havi klarigon, kial la plebiscito ne estis fiasko: ĉar se ĉiuj estus povintaj voĉdoni laŭ sia volo, la germana fuginta reĝaro ne ricevus eĉ pfenigon.

La 20. Junio la incito kaj entuziasmo plej altgrade flamis ĉe laboristaro. Plej akra aktiveco disvolviĝis. Ĉiu proleto volis kunhelpi. Jam frumatene la ruĝaj frontbatalantoj tramarŝis ludante kaj kantante la urbojn, prefere precipe la laboristajn kvartalojn. Parolĥoroj senlace alvokis voĉdoni per "Jes" kaj multaj domoj montris ruĝajn flagojn kaj girlandojn. Senĉese fluis nun la elektantoj en la elektejojn, kaj ankaŭ ne retenis eĉ unu personon la aeroplano, kiu, flugante super Essen, teren ĵetis flugfoliojn: "Via 'Jes' alportos fratmiliton kaj pluan malboniĝon ekonomian". Nu, proletoj ja scias, ke pri ekonomia malboniĝo nur *"ĉiam ili"* kulpas.

Anoj de faŝistaj organizaĵoj diversloke provis malhelpi la elektantaron! En urboj ili tute fiaskis, ricevante bluajn okulojn kaj enpremitajn nazojn. Alie statis en kamparanaj regionoj. Tie la monarkistoj ĉiurimede malebligis al granda parto la elekton, minacante, ke tiuj "rabistoj", kiuj decidos por eksproprigo tuj estos senlaborigitaj. Okazis en multaj lokoj gravaj kolizioj, sed la faŝistoj ĉiam finfine devis cedi. Menciinde estas, kiel sindone kaj energie la laboristaj sanitaristoj disponis siajn fortojn, portante gekadukulojn kaj gemalsanulojn al la elektejoj. Tiu laboro kostis multan ŝviton, sed proletoj volontege donis sian obolon por atingi la venkon. La proletaro ĉion povas, se ĝi estas unuiĝinta.

Nun kelkaj nombroj. Partoprenis la voĉdonon ĉirkaŭ 36—40 % de la elektrajtigitoj. 14—15 milionoj decidis per "Jes", dum 20 milionoj estis necesaj. En Orient-Prusio el 1 318 663 elektrajtigitoj voĉdonis 263 902 per "Jes", kaŭzo de la nigra malklareco kaj blanka teroro kontraŭ elektantoj. Berlin montras 1 467 237 rajtigitojn, el kiuj 942 654 decidis per "Jes". Hamburg havis 834 702 elektantojn, el kiuj 449 168 jesis la eksproprigon, dum en supera Bavario el 1 537 250 elektpovantoj nur 320 163 jesis. Do videbliĝas, ke en urboj la procenta nivelo estas pli alta ol en kamparanaj regionoj. Konata fakto, kiu ree pruvas la neceson, kapti kaj konvinki vilaĝanojn por l' klasbatalo.

La proletaro germana ne sukcesis kolekti 20 milionojn. La burĝa klaso laborinta kaj laboranta per ĉiurimeda teroro triumfas. Mankas ja kelkaj milionoj da voĉdoniloj. Sed ĉu la rezulto montras la veran bildon? Ne! Ekzistas pli multe da homoj, proletoj kiel "indiferentuloj", kiuj ekkonis, ke voĉdoni en klasa ŝtato signifas nenion, ĉar la publika influo pergazeta ktp. estas en manoj de la burĝaj reakciaj monarkistoj. Kaj se ĉiu voĉdoninto fariĝus proleta klasbatalanto? Estus 15 milionoj! Jen, nia tasko . . . "Plue batali! Igu ni el la unueco de l' voĉdonantoj firman batalunuecon. Fakte, en ĉiu laborejo, oficejo, proleta domo. Eĉ ne unu tagon la reganta klaso povus regi, se 15 miliona armeo ekmarŝas, decidinte ĉion riski por ĉion gajni." *Sao 3414*

El Holando

La humaneco de rotterdama urbestraro

Responde al la letero de la senlaborula Agit-komitato koncerne tion, ke oni ne eksigu el la listo de senlaboruloj laboristojn sen certeco, ke ili tuj havos laboron, la urbestraro komunikis, ke estos eksigitaj el la listoj ĉiuj:

1. Ne edziĝintoj.
2. Agrikultur- kaj ĝardenlaboristoj.
3. Stratkomercistoj kaj kolportistoj, escepte tiujn, al kiuj en la kontakto kun la stratkomercista unuiĝo la subteno estos pagata ĝis la fino de Aprilo k. j.
4. Tiuj, pri kiuj oni povas supozi, ke ili trovos laboron pro la sezono, ekz. kelneroj, tapetistoj, kalkblankigistoj ktp.
5. La subtenatoj, kiuj dum 6 monatoj aŭ plilonge ne estas deklarintaj pri siaj perlaboroj kaj enspezoj.

Plue la subteno estos malpliigita al tiuj, pri kiuj oni certe povas konsideri nesufiĉan aktivecon en la serĉo de laboro. Kaj fine estos eksigitaj el la listo ĉiuj sesdekjaruloj kaj pli aĝaj, pri kiuj oni en la nuntempa stato de la labormerkato povas konsideri, ke ili ne havas ŝancon por trovi laboron. Tiuj maljunuloj estos transdonataj al la socia helpo.

Tia estas la zorgemo de sinjoroj pri siaj "laborbestoj". Oni ĵetas en la buŝegon de malsato centojn da senlaborulaj familioj, forprenante la lastajn mizerajn cendojn, kiujn la patroj ĝis nun ricevis de la senlaborula kaso. Kaj tion oni faras sub la preteksto, ke konsiderante la sezonon ili havas ŝancon por trovi laboron! Jes, jes, oni ja devas ŝpari, kaj tion la sinjoroj kompreneble faras je la kosto de malsatanta proletaro. Oni ja devas ŝpari: antaŭ kelke da monatoj la ministroj plialtigis siajn salajrojn je 1000 (unu mil) guldenoj po jaro. Kaj se oni ne elpremus la lastan viveron el mizera laboristo, oni ja ne povus plialtigi la salajron de ministro je mil guldenoj "je nur mil guldenoj". Por ili ne sufiĉis 12000—13000 guldenoj po jaro, oni ankoraŭ devis aldoni unu mil, sed se senlaborulo ricevas po jaro 728 guldenojn da subteno, tiam tio estas multa, tiam tio estas malŝparo de la regna mono kaj — oni eksigas senlaborulojn el la listoj de ricevantoj de la subteno sub ĉiaj pretekstoj. *Labesko, Aalsmeer.*

La politiko de holandaj fervoj-sinjoroj

Antaŭ ne longe estas konfirmitaj novaj malplialtigitaj tarifoj (pasaĝeraj) por la holandaj fervojoj. La tarifoj validiĝos depost la 1. Julio k. j. kaj el ili denove videbliĝas la celkonscia klaseca agadmaniero de la burĝaj regantoj. Laŭ la novaj tarifoj estas malplialtigitaj la prezoj de la biletoj jene:

I.	klaso	je ĉ.	18 %
II.	„	„	15 %
III.	„	nur	8 %

La prezoj de unutagaj tien-retro, biletoj estas malpliigitaj respektive samprocente, kaj nome proletaro uzas grandnombre tiujn biletojn, dimanĉe matene veturante eksterurben kaj vespere retrovenante.

La libertempaj biletoj por la I. kaj II. klasoj estas malpliigitaj, dum la III. klaso restos validaj la ĝisnunaj tarifoj.

La prezo de abonbiletoj por la unua kaj dua klaso estas rimarkeble malpliigita kaj tiuj de la tria klaso eĉ iom plialtigita. La lasta koncernas precipe la etkomercistojn, kiuj ĉiutage veturas urben kun korbo; la ovoj, butero, fiŝoj ktp. ĝis nun la jarabono por certa distanco estas ekz. 400 3/4 guld., depost la 1. Julio ĝi estos almenaŭ 408 guld. Jen vi vidas, kiel la sinjoroj ĉiel klopodas elpremegi el la malgrasa korpo de proleto por la utilo de la poŝoj de dikuloj (ĉar nur ili ĉe ni povas uzi la klasojn unuan kaj duan), la lastajn groŝojn. Denove doloriga bato en la vizaĝon de la proletaro! *Labesko, Aalsmeer.*

Pri edukado de proletaj infanoj en Holando

Ni vivas en la epoko de kulturo kaj rapida evoluo, tiu estas la penso, pri kiu eĉ neniu burĝeca homo dubas.

Sed ni iom rigardu, kiel statas la afero kun tiu rapida evoluo de la kulturo en Holando, pri kiu tiom laŭte kriadas koncernaj personoj.

Estas ja vero, ke tie-alie oni agas tre moderne. La demokrataj komunumestraroj fondas Montessori-lernejojn. Kompreneble nur unuopajn tie ĉi tie. Oni sendas komisionojn en aliajn landojn, por importi modernajn eduksistemojn kaj metodojn. La partoprenantaj profesoroj faras plezuran vojaĝon, retrovenas, verkas artikolojn kolonlongajn pri tio en burĝaj gazetoj je tiom kaj tiom granda honorario kaj — jen ĉio!

Tiel oni facile atingas la gloran reputacion de antaŭenemulo, progresemulo.

Sed en praktiko la edukado de grandaj popolamasoj estas iom alia. Tion asertas la ciferoj:

En la jaro 1878 estis por 1—30 lernantoj unu instruisto kaj nun por 1—48 unu. Tio laŭ la leĝo. En Amsterdam la komunumo aldonas monon kaj je propraj kostoj donas por 37 lernantoj 1 instruiston.

Plue en 1878 estis 2 instruistoj por 31—70 lernantoj kaj 3 por 71—120. Nun en la jaro 1926 estas la numeroj respektive 49—96 kaj 97—144.

Ĉu tion oni povas nomi plibonigo de la popolklerigado?!

Kaj se oni atentas, ke laboristaj infanoj ĝenerale estas malpli evoluintaj, kaŭze de la medio, ekonomia mizero kaj ke la militaj jaroj estas ruinige influintaj al iliaj nervoj kaj sano, tiam oni devas konsideri, ke la nuntempaj infanoj bezonas multe pli da flegado, prizorgado kaj atenta edukado, ol iam antaŭe.

Tiele, ŝparinte monon de la instruistaj salajroj, nia kalvinista kapitalista registaro povis konstrui kelkajn modernajn lernejojn. Ĉu por ŝajna rekompenco pro la malpliigo de la nombro da instruistoj?

Sed se romaj-katolikaj kaj aliaj religiaj lernejoj devas esti fondataj, tiam oni facile trovas rimedojn por tio. Jes, la edukado ne jam estas sufiĉe malbona. La religia stultigo devas esti ankoraŭ pli fortigita. Kaj la instruistaro mem? Ĉu ĝi havas sufiĉe da aktiveco, sufiĉe da kompreno pri la situacio, por ĝia plibonigo? Ne. Tion oni povas vidi el la revuo de ilia organizaĵo "School en Huis". La nomita organo esperplene parolas pri la nova ministro de popolklerigo, pri la ministro, kiu en sia programo diris jenon: "...fondo de komisiono, kiu esplorus la eblecon pri plua malmultekostigo de popolklerigo..."

Pri ankoraŭ plia malmultekostigo!

Ho, ni jam konas tiun komisionemon!! La religiaj lernejsinjoroj certe scios klopodi, ke la ŝparoj ne estas efektivigitaj je la kosto de iliaj lernejoj. Kaj tiel oni ŝparos denove el la publikaj lernejoj, kies lernanto estas grandparte laboristaj.

La rezultatoj estas antaŭvideblaj!

Jen, per kiaj rimedoj kaj kiel la popolklerigo en Holando estas celkonscie direktata laŭ la interesoj de la reganta klaso.

Labesko, Aalsmeer.

La kongreso de K. P. en Holando

Amsterdam, 22.—26. Majo 1926

Tre grava estis ĉi-kongreso en la historio de la kompartio. Lastatempe la partio luktis kun la "dekstrema" fluo en si, kiu fine rifuzis obei la EKI. resp. ankaŭ la partiestraron, malaprobante ĝian politikon.

En la komenco de la kongreso oni akre diskutis pri ĉi-afero kaj la rezultato estis, ke la dekstremaj delegitoj forlasis la kongresejon kaj kunvenis aparte. Ili reprezentis ĉirkaŭ 1/5 de la partianaro. La tri gvidantoj de la dekstra opozicio (van Ravesteijn, Wijnkoop, van Burink) ne estis venintaj al la kongreso. Poste la kongreso ilin ekspartianigis.

Cetere la kongreso fruktodone laboris.

Interkrampe: nun, du semajnojn post la kongreso jam du opoziciaj partisekcioj rekonis la decidojn kongresajn kaj forlasis la opozicion (unu el ili estas unu el la plej furiozaj kaj gravaj eksopozintoj!). Tiel certe ankoraŭ granda parto de la opozicio retrovenos al la partio, kaj ĝia unueco estos denove pli-malpli reestigita.

La ĝisnunaj atingitaĵoj ĉe la komunista proletaro holanda estas kontentigaj, kaj tion oni plejparte devas skribi en la konton de *per-Esp.* laboro. Niaj spertoj nin konvinkis, ke *per-Esp.* gazetservo estas bonega propagandilo. Neniajn "rezolucioklopodojn" ĉe kongresoj kaj estraroj! Nur *per-Esp.* laboro kaj — la rekonoj mem maturiĝos!

Labesko (Aalsmeer)

Profita bilanco ĉe la ukrainia kooperacio

La ukrainia kooperacio lastatempe grave fortikiĝis: dum la lasta ekonomia duonjaro (Oktobro 1925 ĝis Aprilo 1926) la kooperativaro gajnis 20000000 rubl. da profito (pli ol 10000000 $).

La laborista (urba) kooperativaro estis antaŭe deficita (malprofit-dona), sed dum ĉi 6 monatoj ĝi donis 6000000 profiton.

Ankoraŭ pli kreskis la vilaĝa kooperativaro: dum la lastaj 6 monatoj fondiĝis 700 novaj kooperativoj en vilaĝoj.

En plej favora situacio troviĝas la konsuma kooperativaro: ĝi havas nun pli ol 30000000 rubl. (pli ol 15000000 $) da *propra* kapitalo.

Dneprano

Kongreskomenco 6. Aŭgusto

ĉar la lasta ŝipo el Germanio kun kongrespartoprenontoj nur alvenos la 6. Aŭgusto matene en Leningrad.

Ĉu Marx eraris?

Ĉar la usonaj kamaradoj ne komplezas informi pri la viv- kaj laborkondiĉoj sub la regno de l' dolaro, ni estas do devigataj ĉerpi sciigojn en burĝa gazeto. Se la ĉi-subaj informoj estas mensogaj, ni esperas, ke fine unu kamarado konsentas montri ties malverecon.

"... Antaŭ kelkaj monatoj, la usona oficejo por popolkalkulado esploris la interpartigon de akcioj en iu grupo da industriaj societoj: ĝi konstatis, ke ekde la jaro 1917 ĝis 1922, la nombro de aliaj akciuloj pligrandiĝis de 2537000 ĝis 5050000. La oficialaj statistikoj taksas, ke ĉe Usono, ekde 1902 ĝis 1924, la kiomo da posedantoj de transporteblaj havaĵoj triobliĝis kaj tiu de kapitalistsalajruloj duobliĝis.

Ni konsideru du industri-tipojn. En la jaro 1911, la "Standard Oil Co." (Norma Oleo-Kompanio) en New Jersey kaj ĝiaj 33 filioj apartenis al 6078 personoj. Ok el ili posedis la duonon da akcioj. Hodiaŭ la akciuloj estas 300000. La fervojaj kompanioj en la jaro 1916 enkalkulis 511000 akciulojn. Komence de l' jaro 1925, ili estas 807000 kaj ilia meza parto en la kapitalo malgrandiĝis de 13361 dolaroj ĝis 9000...

Laŭ esploroj de s-ro R. S. Brookings, la 97833 akciuloj de la kompanio "Bell Telephone System" (Bell Telefona Sistemo) apartenas al 98 diversaj profesioj. La pli grandaj pakaĵoj el akcioj, 119300 kaj 43900, estas posedataj de hejmmastrumistinoj kaj de komercoficistoj. Ĉiuj konstrufakoj estas reprezentataj en la akciularo: elektristoj (533), plumbistoj (516), masonistoj (733), brikistoj (156); ankaŭ la alĝustigistoj (1205), fervojistoj (1547), teksistoj (642), metalistoj (460). La taglaboristoj posedas pli da akcioj (4843) ol la industrilaboristoj (3332).

Pligrandiĝanta nombro da firmoj sisteme ebligas al siaj salajruloj fariĝi kunposedantoj. 1)

El la 123751 akciuloj de la firmo "Armour and Co." kaj de la "Swift Company" 56000 estas ĝiaj oficistoj kaj laboristoj. 50000 akciuloj de "United States Steel Corporation" (Usona Ŝtala Korporacio) el la 159000 estas ĝiaj salajruloj. En 56 gas- kaj elektrokompanioj 38% el la oficistoj estas akciuloj. La procento atingas 75 en "Standard Gas and Electric Company" (Norma Gas- kaj Elektra Kompanio), 80 en "Northern States Power Company" (Povo Kompanio de la Nordaj Ŝtatoj)..."

La burĝa redaktoro, kiu komentas tiujn ciferojn, aldonas:

"Inter la kapitalo kaj la laboro ne plu ekzistas konflikto. Daŭras nur ebleco de konfliktoj inter fabrikejoj, kiam la ritmo inter la produktado kaj konsumado ĉesas akordiĝi. Malaperas la socia kontraŭeco. Nur ekonomiaj kontraŭdiroj postvivas. Tamen eĉ tiam daŭros ekzisti solidareco inter kapitalo, laboro kaj produktado en ĉiu entrepreno... La socialigo de l' kapitalo fariĝas sensencaĵo, *ĉar ĝi pli kaj pli celas esti la dispecigita propraĵo de ĉiuj*... Nur prikonsiderindaj restas la problemoj pri ekonomia antaŭkalkulado kaj profesia kooperado..." (El "Le Temps", [Paris] 13. VI. 1926).

Nun mi esperas, ke la spertaj marksistoj-SAT-anoj bonvolos liveri al ni klarigojn pri tiu neantaŭvidita fenomeno, kiu ŝajnas kontraŭdiri la teorion pri senĉese pligrandiĝanta koncentrigo de kapitalo en la manojn de kelkaj individuoj.

Eĉ se ni eltrovos, ke mensogis la burĝa redaktoro, publikigante liajn dirojn ni almenaŭ liveros bonan okazon por pridiskuti temon tre interesan. La SAT-anoj ja ne devas esti kreduloj, sed objektive pensantaj homoj, kiuj senĉese esploras ĉu la faktoj pravigas la doktrinon.

Situacio de laboristoj en pola Silezio

Pasintan semajnon venis en Varsovion delegitaro de senlaboruloj el pola Silezio, konsistanta el 37 pers.

Laŭ ilia raporto en Silezio estas nun 120 mil senlaboruloj, el kiuj nur 70 ricevas ŝtatsubvencion. Situacio de senlaboruloj estas des pli malbona, ke kareco kreskas pli kaj pli rapide. La delegitaro ekpostulis ĉe registaro subvencion.

"Nur en stato de malgranda industrio la laboristo povas esti posedanto de siaj produktiloj..." *„La Kapitalo“*, pĝ. 277, IV. volumo de la franclingva eldono. *Iuelie*

≡ DISKUTEJO ≡

Pri "frontunueco"

MALĜUSTA ESPRIMO. — En Januaro [1]) k-do Zilberfarb laŭdinde invitis la SAT-anaron al larĝa diskutado pri "unuecfronteco" en nia organizo. Jam forpasis kvin monatoj kaj mi konstatas, ke la inviton atentis malmultaj k-doj.

Kion ni konkludu el tio? Ĉu do la temo interesa ne estas? Ĉu la danĝero, pri kiu parolis nia k-do, ne ekzistas? Aŭ ĉu mankas en niaj vicoj diskutema vigleco?

Mi starigas la demandojn, sed ne provos ilin respondi, ĉar tion fari mi povus nur tre subjektive. Sed notinda estas la fakto, ke ĝis nun sole tri k-doj opiniis utila konigi en "Senn." sian vidpunkton pri frontunueco en SAT.

Kvankam tre malfrue, mi tamen volas hodiaŭ iomete kontentigi k-don Zilberfarb, montrante, ke estas almenaŭ *kvar* SAT-anoj, kiuj konsentas pridiskuti la proponitan temon.

Ĝi ja estas diskutinda. Mi nur bedaŭras, ke tiu diskuto okazigos multe da rediroj. Sed ĉar la sperto montras, ke la celo kaj taskoj de SAT estas mis- aŭ eĉ tute nekomprenataj, necesas do forbalai la amason da eraroj kaj fantaziaĵoj, kiuj baras al la normala malvolviĝo de nia Asocio.

Estas ja bedaŭrinda fakto, ke tro da k-doj ne komprenis ĝis nun, ke SAT devas havi tute apartan karakteron, tute *difinite limigitan* kampon. Tro multaj emas konsideri nian organizon kvazaŭ filion de sia partio, aŭ eĉ kiel ian partion, se ili estas senpartiuloj. Tial, malgraŭ multaj deklaroj kaj dum kongresoj unuvoĉe akceptitaj rezolucioj, la emo enkonduki en SAT la disputpunktojn, kiuj disigas la laboristan movadon, estas ĉiam sentebla. Tia emo rezultas el tio, ke la disputemuloj ne havas klaran ideon pri tio, kio povas esti esperantista *tutmonda* Asocio.

Pruvon pri tio mi eĉ trovas en la termino uzata de k-do Zilberfarb kaj de aliaj, por difini la celon de SAT.

La termino "frontunueco" havas historie politikan sencon. Ĝi signifas, ke la proletara klaso estas dise organizata, ke tiu diseco kaŭzas ĝian malforton kaj, sekve, ke en kelkaj okazoj malsamaj organizoj devas kunigi siajn fortojn, por pli sukcese kontraŭbatali la kapitalistaron. Mi ne bezonas citi ekzemplojn, kiujn certe ĉiu havas ĉe la memoro.

Frontunueco ne signifas unuecon en unu sola organizo, sed nur okazan komunan agadon. Nu, ĉu tia estas la demando, kiam temas priparoli la celon kaj taskojn de SAT? Tute ne. Povus temi pri frontunueco se, ekzemple, nia asocio proponus al UEA en iu cirkonstanco komunan agadon por iu difinita kaj limigita celo. Tiam la termino "unuecfronteco" estus uzata laŭ ĝia vera senco.

[1]) Vidi la n-ojn 68 kaj 69 de "Senn.".

Sed k-do Zilberfarb ne eĉ aludis pri tia kunlaborado; sekve la termino elektita ne respondas al la realo; ĝi nur povas krei konfuzon kaj miskomprenon; ĝi sekve devas esti forlasata.

*

ORGANIZUNUECO. — Necesas ekrigardi la ĝeneralan staton de l' laborista Esp.-movado kaj sin demandi, ĉu la vidpunkto de la iniciatintoj de SAT estis ĝusta aŭ ne. Ĉu ili pravis, penadante arigi la laboristajn Esp-istojn el ĉiuj tendencoj en unu solan organizon?

Utilas rememori, ke, antaŭ kelkaj jaroj, ne mankis pesimistoj, kiuj profeteme asertis, ke tia entrepreno estas tute neefektivigebla; ke estas perdi tempon klopodi, por ke anarkistoj, komunistoj, socialistoj, sindikatistoj kunlaboru en sama asocio.

Skeptikaj tiaj diroj pli ol unu fojo trafis nin. Kaj estas konfesende, ke mi mem ne estis senigita je duboj pri la ebleco de sukceso. Sed, aliparte, mi havis la firman konvinkon, ke ne estas alia bazo por ekzisto de viv- kaj laborkapabla organizo esperantista, ol tiu, nome: *kunlaborado de ĉiuj Esp.-laboristoj sen diferenco pri partio aŭ tendenco.* Aliel povas ekzisti nur mizeraj sektetoj.

Malgraŭ duboj, kritikoj kaj eĉ mokoj, ni do persiste laboradis, por efektivigi la "neefektivigeblan" planon.

Ĉu ni sukcesis? Por respondi tiun demandon, sufiĉu memorigi, ke baldaŭ SAT kongresos por la sesa fojo; ke kvankam malrapide, ĝia anaro plinombriĝas ĉiujare; ke ĝia eldonforto kreskas konsiderinde. Unuvorte sufiĉu noti, ke nia asocio estas la sola kun UEA, kiu povas iomete fieri pro sia tutmondeco kaj pro tio, ke fakte ĉiutage ĝi aplikas Esp-on.

Sekve la entrepreno, kiu, antaŭ 5—6 jaroj, ŝajnis al malnovaj spertaj Esp.-istoj tute neefektivigebla, tamen ekzistas, prosperas, funkcias . . .

La organizunueco estas do bazo, sur kiu oni povas konstrui; ĝi eĉ estas la sola, kiu ebligas la ekziston de impona kaj laborkapabla asocio. Sesjara sperto ja montris la eblecon de kunlaborado inter anarkistoj, komunistoj, socialistoj, sindikatistoj.

*

NECESA KAJ SUFIĈA KONDIĈO POR KUNLABORADO. — Por ke la kunlaborado de diversopiniaj elementoj estu ebla en sama organizo, necesas, trovi la punktojn, pri kiuj eblas la ĉies interkonsento. Necesas plie, limigi severe la kunlaboradon je la difinitaj punktoj. Se la limoj estas transpaŝataj, tuj okazas disputoj, malkonsento — fine disiĝo.

Ni do difinu la punktojn, pri kiuj estas eble atingi interkonsenton.

La unua punkto estas jena: 1. Necesēco kunagadi, por trudi al ĉiuj laboristaj organizoj la alprenon de Esp-o. 2. Tia altrudo ne povus esti atingata per nura propagando de la lingvo; necesas do montri per faktoj, ke ĝi ekzistas, funkcias, utilas. 3. La nombro de k-doj bone scipovantaj Esp-on, kapablaj verki, raporti aŭ traduki, estas relative tre malgranda; konsekvence necesas la kuniĝo de ĉies fortoj sen atento pri partieco aŭ diversopinieco rilate al aliaj demandoj.

Ĝis tiam ĉio iras glate. Necesas nun limigi en la *praktiko* la kampon de l' konsentebla kunlaborado. Kaj jen aperas la malfacilaĵo.

Nun ŝajna malfacilaĵo, tamen. La vojo ebeniĝas, se ĉiuj konscias pri la neceseco forigi la rokojn aŭ preterpasi ilin. Kompreneble, se mallarĝe vidantaj obstinuloj aŭ blindaj fanatikuloj ne volas atenti la barojn, aŭ eĉ penas plinombrigi ilin, la komuna irado ne povas daŭri longe. Sed tiauloj estas certe malmultnombraj; ili povas nur iomete ĝeni, sed ne haltigi la antaŭeniradon.

*

Plej bona pruvo pri utiligebleco de Esp-o estas tio, ke k-doj povas per la SAT-aparato ricevi helpon en serĉado de laboro, dum vojaĝo, aŭ por fari enketojn. Nu, ĉu ne estas fakto, ke jam ofte okazis, ke komunista SAT-ano ricevis helpon aŭ servon de anarkisto, de socialisto — aŭ inverse? Kaj kiu neos, ke, rilate tian servadon, asocio estas des pli kapabla, ju pli ekzistas urboj kaj lokoj, en kiuj ĝi havas membrojn? Sekve pri tiu unua punkto kunlaborado estas profita — do ebla kaj sekve nepre alcelenda.

Sed ne ĉiu Esp-isto vojaĝas, enketas ktp. Kian do profiton havos la aliaj k-doj per sia aliĝo al SAT?

Oni povus respondi, ke sufiĉas deziri la sukceson de Esp-o en la laboristaj medioj, por havi intereson subteni la organizon, kies utileco por tion atingi estas plejege certa.

Tamen mi preferas diri, ke la praktikado de nia lingvo ne limiĝas je la nuraj okazoj priparolitaj ĉi-supre. La eldono de gazetoj, de libroj ktp. estas ankaŭ praktika aplikado de Esp-o. Ĉiu ja konsentas, ke la ekzisto de ampleksa literaturo estas treege grava por la mondlingva movado.

— Vi alvenas al la tikla punkto, avertas min iu skeptikulo. Kion vi eldonu? Kion vi publikigu?

— Estas fakto, ke ĝis nun la malkontentoj ĉefe okazis pro publikigitaj aŭ rifuzitaj artikoloj. Kredeble pri tiu aparta demando ni ne ankoraŭ trovis la ĝustan respondon. Almenaŭ estas certe, ke ne ĉiuj kunlaborantoj de la SAT-organoj komprenis la necesecon eviti la pritraktadon de demandoj — eĉ de faktoj — kiuj riskas enkonduki disputojn nepre forigendajn.

Oni tamen ne miru pro tio. SAT estas ja tro juna organizo, por ke jam ekzistu ĉe siaj membroj ia speciala kaj nepre kulturenda spiritostato, ebliganta senpene lasi flanke la dornajn kaj disputigajn temojn.

En nacilingvaj gazetoj furiozas la polemikuloj. En kunvenoj kaj kongresoj la gvidantoj de iu partio insultas la alipartiajn gvidantojn. Insultoj respondas al insultoj. En tia febra atmosfero vivas multaj el niaj membroj. Estas do memkompren-

eble, ke ili emas kunporti en la asocion iom da polemika febro.

Necesas kuracilo kontraŭ tia febro. Kaj ne ekzistas alia ol la firma konvinkiĝo, ke estas ega malsaĝaĵo, plej grava sensencaĵo, plej evidenta nekompreno pri la celo kaj taskoj de nia organizo, transporti en ĝin la temojn pridisputatajn en aliaj organizoj. Mi ne volas diri, ke tiuj polemikoj estas malnecesaj en la koncernaj organizoj. Mi nur asertas, ke la disputantoj devas disputi ĉe la disputejo mem kaj ne en SAT.

Bonan pruvon pri tiu emo, fari el SAT filion de partio kaj sekve enkonduki la disputpunktojn, kiuj disigas la laboristan movadon mi trovas en la artikolo subskribita *Katilina* kaj aperinta en la n-o 75 de "Senn.", responde al k-do Zilberfarb. Katilina, kiu titolis sian artikolon: "Frontunueco aŭ vera klasbatalo", skribas interalie: "Difini la celojn de SAT kiel realan proletan agadon kaj fidi pri la kunlaborado de ĉiuj proletaj direktoj — ĉu jen ne estas la kontraŭdiro en premisoj?" Kaj pli poste: "Ni estu elprenendaj: SAT unuecfronta, senseksa, lingvoscienca proleta organizaĵo, aŭ SAT unudirekta revoluciema proleta batalanto?!"

Tiu eltiro sufiĉas por klare montri, kiagrade Katilina eraras en la kompreno pri la celo kaj taskoj, kiujn povas plenumi tutmonda Esp.-organizo. SAT estu unudirekta proleta batalanto. Vere! Nur tio? — Kia sensencaĵo! Ĉu do la kelkmilmembra SAT devas organizi kaj gvidi la revolucian movadon? Por kio do utilas la partioj kaj organizoj, kiuj ĝuste difinis al si tiun taskon? Se SAT estus eĉ 100 000 membra, ĝi ne devus okupiĝi pri organizado de ribeloj; samkiel estus sensence, se ĝi volus organizi kaj direkti strikojn. Ekzistas ja por tio sindikatoj.

Se nia asocio agus laŭ la deziroj de nia konspirema k-do, la politikaj partioj kaj lab. organizoj rajtus malpermesi al siaj membroj aparteni al tia asocio, kiu faras konkurencan kaj sekve disigan laboron.

Ni ne fantaziu. Kiel SAT-anoj ni estu modestaj. Kiam eksplodos revolucio, ni partoprenu ĝin, sed ne sub la standardo de SAT mem, sed sub tiu de la organizoj, kiuj difinis al si tiun taskon. Kiam okazas striko, la SAT-anoj striku, se ilia sindikato ordonas ĉesi la laboron. Sed ni ĉiuj konsciu, ke ribelado kaj strikado ne estas SAT-afero. La tasko de nia asocio povas esti nur tute alia.

Ĉu tio signifas, ke ĝi estas nenecesa? Tute male. La SAT-anoj estas ja klasbatalemaj kaj deziras la venkon de l' proletaro sur la tutmonda skalo. Ili estas firme konvinkitaj, ke tia revolucio estus tre pli facile organizebla, se ne ekzistus la lingvaj baroj. Ili ĉagrene konstatas, ke la revoluciaj partioj kaj sindikatoj malatentas tiujn barojn. Tial ili opinias necesa la ekziston de aparta asocio kun speciala kaj difinita celo, nome laboradi, por detrui tiujn lingvajn barojn.

Jen kia nur povas esti la modesta sed necesa tasko de SAT. Ĉio cetera estas nebule elpensita fantaziaĵo.

Ĉar ne povas temi pri "unudirekta", "revoluciema", do politika agado, jen kial estas ebla en SAT la kunlaborado sur limigita kampo de ĉiuj senescepte Esperantistoj, kiuj celas "utiligi praktike Esp-on por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda", kiel estas dirite en nia statuto.

Resume, por ke estu ebla la komuna agado en iu ajn asocio, NECESAS, ke la membroj interkonsentu pri kelkaj gravaj punktoj; kaj SUFIĈAS, ke ili severe limigu sian agadon en la asocio je la prikonsentitaj punktoj.

Tiun kondiĉon neniam forgesu la SAT-anoj. (Pluo sekvos) *E. Lanty.*

ATEISMO

Floreto el roma marĉo

En paroĥo Górka Pabjanicka antaŭulo de nuna paroĥestro propramaniere tondis siajn paroĥanojn. Du fraŭlinoj Kacprzak edziniĝis: unu post alia dumsemajne. Dum paroĥaj formulaĵoj antaŭgeedziĝaj fianĉo demandis la paroĥestron:

— Kiom kostas geedziĝo?

— 200 florenojn, frateĉjo — respondas modeste diservulo.

— 200 florenojn? Pasintan semajnon paroĥestro ja edzinigis mian fratinon por 100 florenoj!

— Vere, vere, frateĉjo . . . Sed la cia estas duoble pli bela ol la fratino, do pago por geedziĝa sakramento devas esti duobla. — La fianĉo ne havis argumentojn.

Evolucio, Revolucio kaj Anarkisma Idealo

de *Elisée Reclus*

Evolucio estas la senfina movado de ĉio ekzistanta, la senĉesa transformiĝo de Universo kaj ĉiuj ĝiaj partoj, de la eternaj originoj kaj dum la senfino de la jararoj. La faktaj vojoj, kiuj ekaperas en la senlimaj spacoj, densiĝas kaj disneniiĝas dum milionoj kaj miliardoj da jarcentoj; la steloj, la astroj, naskiĝantaj, agregatiĝantaj kaj diseriĝantaj; nia suna sistemo kun ĝia centra astro, ĝiaj planedoj kaj lunoj; kaj, inter la malvastaj limoj de nia eta terglobo, la montoj, kiuj subite estiĝas kaj foriĝas; la oceanoj, kiuj formiĝas por elsekiĝi poste; la riveroj, kiujn oni vidas ekflui en la valoj, poste elvaporiĝi kiel matena roso; la generacioj da kreskaĵoj, bestoj kaj homoj sinsekvantaj kaj niaj milionoj da nerimarkeblaj vivoj, de la homo ĝis la muŝeto, ĉio tio estas nur fenomeno de la granda evolucio fortrenanta ĉion en sia senfina turniĝo.

Kompare kun tiu ĉefa fakto de la evolucio kaj de la universala vivo, kio estas ĉiuj tiuj etaj okazintaĵoj nomitaj revolucioj: astronomiaj, geologiaj aŭ politikaj? Nur vibroj preskaŭ nesenteblaj, nur ŝajnoj se tiel oni povus diri. Miriade kaj miriade revolucioj sinsekvas en la universala evolucio: sed tiom malgravaj kiom ili estas, ili partoprenas en tiu senfina movado.

Tiel scienco vidas nenian kontraŭecon inter tiuj du vortoj evolucio kaj revolucio, tiel similaj, sed kiuj, en komuna lingvo, estas uzataj en senco tute diferenca de sia unua signifo. Malinklinemaj vidi en ili faktojn samspecajn, nur diferencaj laŭ la amplekso de la movado, la tro timemaj homoj, timigitaj antaŭ ia ajn ŝanĝo, afektas doni al la du vortoj sencon absolute kontraŭan. Evolucio, sinonimo de iompostioma disvolviĝo, senĉesa en la ideoj kaj moroj, estas prezentata, kvazaŭ ĝi estus la malo de tiu timigaĵo "Revolucio", kiu envolvas ŝanĝojn pli malpli subitajn en la faktoj. Kun ŝajniga entuziasmo, aŭ eĉ sincera, ili paroladas pri evolucio, pri la malrapidaj progresoj efektiviĝantaj en la cerbaj ĉeletoj, en la sekreto de la inteligentoj kaj koroj; sed oni ne parolu al ili pri la abomeninda revolucio, kiu, elirante subite el la spiritoj, eksplodas sur la stratojn, iafoje akompanata de kriegoj de la amaso kaj bruego de la armiloj.

Ni konstatu unue, ke oni elmontras sian nescion, imagante inter evolucio kaj revolucio kontraston de paco kaj milito, de dolĉeco kaj perforto. Revolucioj povas efektiviĝi pace, sekve ŝanĝo de subita en la medio, nepriganle returniĝon en la interesoj; same evolucioj povas esti treege penigaj, miksitaj de militoj kaj persekutadoj. Se la vorto evolucio estas volonte akceptata de tiuj, kiuj vidas la revoluciulojn kun abomeno, t. e. ĉar ili ne komprenas ĝian valoron, tial ke la aferon mem ili absolute ne volas. Ili certe parolas pri progreso ĝenerale; sed ili forpuŝas progreson aparte. Ili opinias, ke la socio, tiom malbona kiom ĝi estas, kaj tiel kiel ili mem ĝin vidas, estas konservinda; sufiĉas, ke ĝi realigu ilian Idealon: riĉeco, potenco, ŝatateco, bonstato. Tial, ke ekzistas riĉuloj kaj malriĉuloj, potenculoj kaj subuloj, mastroj kaj servistoj, cezaroj, kiuj ordonas batalon kaj gladiatoroj irantaj al morto, la sagaculoj nur bezonas sin turni flanken de la riĉuloj kaj mastroj, kaj iĝi korteganoj de cezaroj. Tiu socio disdonas panon, monon, oficojn honorajn, nu! la sprituloj agu tiamaniere, ke ili havu sian parton, kaj la plej larĝan kiel eble el ĉiuj donacoj de la sorto. Se ia bona stelo, zorginte je ilia naskiĝo, antaŭgardis ilin kontraŭ ia ajn batalo pri la vivo, donacinte al ili, kiel heredaĵon, la neceson kaj superfluon, pro kio ili plendus? Ili penas konvinkiĝi, ke la tuta mondo estas tiel kontenta kiel ili estas; se satmanĝis homo ĉiuj homoj bone tagmanĝis! Koncerne la egoistulon, kiun socio ne riĉe provizis tuj en lia lulilo, kaj kiu, por si mem, malkontentiĝas pro la ĝenerala stato, ĉu li almenaŭ ne povas esperi situacion, konkiri per intrigo aŭ flatoj, per favora okazo, aŭ eĉ per peniga laboro, je la servo de la potenculoj. Kian signifon

Kongreskaravanoj al Leningrad

LONDON—LENINGRAD

Klopodoj de niaj sovetlandaj k-doj ĉe la rusa ŝip-kompanio "Sovtorgflot" sukcesis garantiatan rabaton de 40%. Do, la prezo por veturado de London ĝis Leningrad enklusive la manĝaĵo kaj dormtolaĵo estas nun: 6 funtoj, 12 ŝilingoj — reen 66 rubloj.

La ŝipoj forveturos Londonon: Ŝipo "Sovet" 23. VII., vespere, alveno en Leningrad 29. VII., matene; ŝipo "Herzen" (Gercen) 30. VII., alveno en Leningrad 5. VIII., matene.

Tion nur por nuna informo, certe k-do *Sons*-Anglio en la sekvanta n-o aŭ per cirkulero donos pli detalajn informojn al la k-doj, partoprenontaj tiujn karavanojn. La rabato estos donata kontraŭ montro de la kongreskarto aŭ delegit-legitimacio de Esp.-organizaĵo.

GERMANIO—LENINGRAD

Ekzistas du eblecoj veturi Leningradon per ŝipo, nome de Stettin kaj de Hamburg. De Hamburg ni povus veturi per rusa ŝipo sub samaj kondiĉoj kiel supre cititaj (sub London—Leningrad). De Stettin ni nur povas veturi per germana ŝipo. Pro tio ni decidis formi du karavanojn (de Hamburg kaj de Stettin po unu).

Hamburg—Leningrad. La ŝipo "Jutar" forveturos el Hamburg la 25. VII. vespere kaj alvenos en Leningrad la 30. VII. matene. — La ŝipo "Jamal" forveturos el Hamburg la 1. VIII. vespere kaj alvenos en Leningrad la 6. VIII. matene. La veturprezo estas de Hamburg ĝis Leningrad kun manĝaĵo kaj dormtolaĵo 60 markoj. Sur la ŝipo nur estas unu klaso (kiu laŭ la diroj de la kompanio egalas al la unua klaso de vaporŝipaj linioj).

Stettin-Leningrad. La ŝipo de la Stettina vaporŝipkompanio forveturos el Stettin la 31. VII., posttagmeze je la dua. Interferdeka loko, do tria klaso, unu veturo kostas 80 mk. Ferdeka loko sen manĝaĵo kaj sen garantio por dormejo kostas 40 mk. Ŝajnas, ke nur la lastan lokon intencas okupi kelkaj k-doj nehavante la sufiĉan monon por elspezi pli por la veturo. Sed por tiu loko la ŝipkompanio promesis superkovri la malantaŭan ferdekon per oelita tuko kaj liveri krom tio pajlajn dormmatracojn.

Ĉar do ne jam estas tute klara la afero, kaj ĉar ni laŭeble povu doni al ambaŭ ŝipkompanioj certajn informojn, ni petas, ke la k-doj anoncu ankoraŭfoje al la suba adreso, per kiu ŝipo ili intencas veturi. Certe la plej multaj preferas veturi nun de Hamburg. Sed tion ni devas anonci al la koncerna kompanio plej frue. Krome ni ankaŭ devas informi la alian ŝipkompanion. Do, ankaŭ k-doj veturontaj per la ŝipo de Stettin senprokraste anoncu tion. Kaj tiuj k-doj, kiuj ne povos veni antaŭe al Leipzig, sendu la monon (40 mk. poŝtmandate) al la suba adreso por prizorgo de la ŝipkartoj ktp. Kiamaniere vi ricevos la ŝipkartojn, vi sciiĝos per cirkulero pli detala.

K-doj, antaŭe vizitontaj Leipzig, atentu jenon: Kiuj veturos per la ŝipo de Hamburg, estu almenaŭ sabaton (31. VII.) vespere en Leipzig. La vagonaro forveturos de Leipzig (rapidigita vagonaro 4. klaso) vespere je la dekunua. Do, vi venu aŭ al k-do Bässler aŭ atentu en la stacidomo. La k-doj, uzontaj la ŝipon de Stettin kaj antaŭe venonte al Leipzig, almenaŭ estu en Leipzig vendredon (31. VII.) tagmeze. Ili anoncu sin ankaŭ tuj poŝt alveno ĉe k-do Bässler, kiu loĝas tute proksime de la ĉefstacidomo.

Otto Bässler,
Leipzig, Gerberstr. 24, H.

Abortoj en Sovetio

Laŭ statistikaj datoj nuntempe en Sovetio okazas 150 000 abortoj ĉiujare, el ili 65 000 en vilaĝoj. En urboj 3/4 de la abortoj okazas oficiale, t. e. per kuracistoj, en malsanulejoj, kaj nur 1/4 neoficiale, per fuŝistinoj. Sed en la vilaĝoj, bedaŭrinde, ankoraŭ 60% okazas neoficiale. En Moskvo 1924 estis registritaj 14 000 abortoj, en Leningrad 1925 — 7000. En la naciaj respublikoj, tatara, kirgiza ktp., abortoj — pro religiaj kondiĉoj — estas pli malofte ol en Rusio. 1000 virinoj ĉiujare mortas en Sovetio pro aborto. III. Tutunuiĝa Konferenco por Gardo de Patrineco kaj Infaneco decidis kontraŭbatali abortojn per plej larĝa diskonigo de rimedoj kontraŭ gravediĝo. *H. Frank, Perm.*

---

havus por li socia evolucio? Evoluci cele al riĉeco estas lia sola ambicio. Malinklinema celadi al justeco por ĉiuj, sufiĉas al li aspiri al privilegio por sia propra persono.

Tamen ekzistas timemaj spiritoj, kiuj honeste kredas al evolucio de la ideoj, kiuj malprecize esperas korespondantan transformiĝon de la aferoj, kaj kiuj tamen, pro sento de instinkta timo preskaŭ fizika, volas, almenaŭ dum vivo, eviti ian ajn revolucion. Ili elvokas kaj samtempe elpelas ĝin; ili kritikas la nuntempan socion, kaj revadas pri estonta socio, kvazaŭ ĝi devus subite realiĝi, dank' al ia miraklo, sen ia ajn rompiĝkrako okazinta inter la pasinta mondo kaj la estonta. Nekompletaj estaĵoj, nur la deziron ili havas, sed ne la penson: ili imagas, sed ne scias voli. Apartenantaj samtempe al la du medioj, kaj fatale kondamnitaj ilin ambaŭ perfidi, en la socio de konservativuloj ili estas elemento de ruinigo per siaj ideoj kaj paroloj, en tiu de revoluciuloj ili fariĝas troege reakciuloj, ĵure forlasante siajn dumjunecajn instinktojn, kaj similaj al la hundo priparolita en Evangelio, reirantaj al tio, kion ili vomis. Tiel, dum la Revolucio, la plej ardaj defendantoj de la malnova reĝimo estis tiuj, kiuj iam ĝin persekutis per siaj mokoj: de pioniroj ili fariĝis renegatoj! Tro malfrue ili ekkomprenis, kiel la mallertaj magiistoj de la legendo, ke ili estis senbridigantaj tro timindan fortegon por sia malforta volo, por siaj timemaj manoj.

Alia klaso da evoluciuloj estas tiu de individuoj, kiuj, el la tuto de la efektivigindaj ŝanĝoj, nur vidas nun, kies realigon ili celas metode, animstreĉe, rigore, tute nezorgante pri aliaj transformiĝoj. Antaŭ ĉio ili limigis sian laborkampon. Kelkiuj lertuloj volis tiamaniere paciĝi kun siaj konsciencoj, kaj labori por estonta revolucio, sendanĝere por si mem. Pretekste dediĉi siajn penojn al baldaŭa reformo, ili ne plu vidas ian ajn superan idealon, kaj forpuŝas ĝin, eĉ kolere, por ke oni ne suspektu ilian al ĝi partoprenon. Aliaj pli honestaj, aŭ tute respektindaj, eĉ iel utilaj al la efektivigo de la granda ellaboraĵo, estas tiuj, kiuj celas efektive, pro malvasteco de spirito, nur unu progreson. La sincereco de ilia penso kaj konduto ilin metas super kritiko; ni nomas ilin "fratoj", kvankam konstatante ĉagrene kiom malvasta estas la batalkampo en kiun ili enfermiĝis, kaj kiamaniere, per sia nura kaj speciala kolero kontraŭ unu maljustaĵo, ili ŝajnas konsideri kiel justaj ĉiujn aliajn maljustaĵojn.

Mi ne parolas pri tiuj, kiuj elektis, kiel celojn cetere bonegajn, ĉu reformon de ortografio, ĉu reguligon de la horo, aŭ ŝanĝojn de meridiano, ĉu forigon de korsetoj aŭ felĉapoj; sed ekzistas propagandoj pli seriozaj, ne ridindaj, postulantaj ĉe siaj ĉefroluloj kuraĝon, persistemon kaj sindonemon. Tuj kiam revoluciulo konstatas ĉe la novigemuloj perfektan honestecon, fervoran sindonemon kaj malatenton al danĝero, li ŝuldas al ili sian simpation kaj respekton. Ekzemple: Kiam ni vidas virinon kun puraj sentoj, nobla karaktero, sendifekta laŭ ĉies opinio, malsupren veni al la prostituino, kaj diri al ŝi: "ci estas mia fratino, mi kuniĝas al ci por batali kontraŭ la policano, kiu cin insultas kaj metas la manon sur cian korpon; kontraŭ la polica kuracisto, kiu arestigas cin per policistaĉoj kaj cin sekstenencas per sia vizito; kontraŭ la tuta socio, kiu malestimas cin, kaj cin piedpremadas"; neniu el ni, pro ĝeneralaj konsideroj, malfacile konsentus sian respekton al la kuraĝa evoluciulino, batalanta kontraŭ la malĉasteco de la oficiala mondo. Sendube ni povus diri al ŝi, ke ĉiuj revolucioj interligiĝas, ke la ribelo de individuo kontraŭ la ŝtato rilatas al la punlaborulo, same kiel al la prostituino; tamen ni ne malpli admiras tiujn, kiuj bone batalas sur tiu mallarĝa limigita kampo. Same ni konsideras kiel heroojn ĉi-tiujn, kiuj en ia ajn lando, dum ia ajn jarcento, sin oferis por komuna afero, sen kaŝita penso, kia ajn mallarĝa estis ilia horizonto! Ĉiu el ni ilin emocie salutu, kaj diru al si: "ni lernu ilin egali sur nia batalkampo, tiom pli vasta, ĉar ampleksiganta la tutan terglobon. (Daŭrigota)

KRONIKO

Aŭstrio

Wien. La 12. Junio okazis kunveno de SAT-anaro. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 50 SAT-anoj. Kiel tagordo oni decidis: 1. V. SAT-Kongreso. 2. SAT-laboroj. 3. VI. Kongreso. La kunsido elektis 2 revizorojn, kiuj havas la taskon, finfine postuli kaj aranĝi la finkalkulon de la kongreskomitato. Unuanime oni kondamnis, ke nun kelkajn semajnojn antaŭ la VI. Kongreso, la komitato de la V. Kongreso ankoraŭ ne trovis necesa la finkalkulon kaj la raporton pri la V. Kongreso kaj eĉ opiniis senvalore ĉeesti la kunsidon. Poste estis priparolata la interrilatoj de SAT kaj ALLE. Oni akceptis proponon, kiu postulas enpresigon de favoraj artikoloj en la organoj de ambaŭ asocioj rilate al la alia organizaĵo. Fine oni decidis de nun pli regule kunveni, laŭplane organizi la SAT-movadon kaj membrovarbadon kaj oni decidis starigi komisionon, kiu havas la taskon regule raporti pri la movado al "Senn." kaj verki pri la aŭstriaj cirkonstancoj artikolojn. Estis interkonsentite, de nun disvolvi planan laboron, por ke de nun ne dependu la progreso de SAT en nia urbo kaj lando de la nura hazardo. Per la alvoko kune labori kaj per la Internacio finiĝis la bonevizitata kunsido. La tagordo estos daŭrigata en venonta kunsido.
SAT-ano 4282

Germanio

Halle. Ammendorfaj SAT-anoj veturigis festveturilon en la festdemonstracio okaze de la regna laborista sport-tago en Germanio, okazinta je la 6. Junio, kaj en Ammendorf kune kun inaŭguro de nova sportplaco. La aranĝo de ĉi-veturilo celas figure demonstri al la laboristaro la faman devizon: "Proletarioj el ĉiuj landoj, unuiĝu" per Esperanto!
SAT-ano 2002

Untermenzing apud München (Bavario). Post propagandoparolado de k-do 30 novevarbita SAT-ana k-do 5129 klopodis aranĝi komencantan kurson. La sukceso estis 28 eklernintoj. Nun post paso de kurso ni aranĝis lunde, la 21. Junio specialan kunsidon, kiu celis, fondi la grupon. Ni sukcesis ĉiujn finlernantojn (20) anigi la LEA por la germanlingvaj regionoj. Unu estas SAT-ano. Ni sendas al la tutmonda sennaciularo nian plej sinceran, koran fratsaluton. Ni ĝojus, ricevi kuraĝigajn adresojn. Adreso de la grupo: *Karl Weber, Untermenzing* bei München, Germanio, Neumeierstrasse 21. *1810*

Svedio

Stockholm. "Signalen", gazeto por fervojistoj, la 10. kaj 17. Junio enhavis artikoletojn pri "Senn." kaj "S. R.". La artikoloj montras la taŭgecon de Esp-o kiel mondlingvon, precipe por personoj havante intereson scii pri vivkondiĉoj por alilandaj laboristoj, kaj ke la menciitaj revuoj estas plej bonaj iloj por trovi tiajn sciigojn.

Esperanto en sveda sindikata gazetaro. Dum pli ol du jaroj ni havis konstantan Esp.-kolonon en la gazeto de Sveda Fervojista Asocio "Signalen". Ĝi estas bone redaktita de nia k-do parlamentano Ernst Eriksson. Tiu gazeto ankaŭ enhavis tutan kurson de Esp-o.

Nun ankaŭ la organo de Sveda Marista Unio "Sjsemannen" komencis publikigi kurson, ellaborita de k-do Einar Adamson. Per la laboro de Sveda Laborista Asocio oni nun instigis la gazeton de Sveda Frizista Asocio ("La Frizisto") agiti Es-pon. En ĝia lasta n-o estis artikolo pri Esp-o kaj en venonta n-o komenciĝas kursoj, redaktita de k-do Adamson.

Ankaŭ la gazeto de Sveda Poŝtista Asocio ("La Poŝtisto") ofte havas artikolojn pri Esp-o kaj tradukitaj el Esp-o. Tia laboro prizorgas k-do Ernst Eriksson.

En la gazeto de telefonlaboristoj "Mikrofon" ni ofte renkontas artikolojn pri Esp-o, skribitajn de k-do Arvid Agren en Eskilstuna.

Malrapide venas rezultoj, sed iom post iom ni certe atingos videblajn venkojn.

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L — letero. PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. espaĵo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

K-do *Hans Hajny,* Grundsteingasse 34/6, *Wien XVI,* dez. koresp. k. ĉ. l. escepte germanaj.

— *Bilanclibrotenisto,* aŭstriano, edzo, serĉas postenon, en germ.-lingvaj regionoj de Sovetio, kiel organizanto. Afablajn sciigojn sendu al *SAT-peranto en Wien.*

Ĉekoslovakio

K-do *Josef Peŝek,* Škvrnanská trida, 19/III, *Plzen,* dez. koresp. pri lab. movado, turismo kaj sporto, k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-do *Josef Schweinfurter, Holeischen 167 apud Pilsen,* dez. koresp. pri prol. revolucio, ĝia programo, pri taktikaj teorioj de socialismo: Anarkismo, bolĉevismo, revisionismo. Seriozaj k-doj al la fronto!

Francio

Komĉeloj de k-doj laborantaj en malsanulejo por spiritmalsanuloj, dez. koresp. k. s. komĉeloj en Sovetio k. Germanio. Sciigoj ricevotaj estas publikigataj en la gaz. de la ĉelo. Adr.: K-do *Robert Soudant,* instruisto, Ecole de Garçons, rue de Juvisy, *Athis-mons* S. et O. — La sama dez. koresp. kun k-doj el Sovetio pri kom. movado, gravaj politikaj kaj ekonomiaj okazintaĵoj. Li tenas sin je dispono de kom. gazetoj por ĉ. sciigoj pri Francio.

— K-do *Romain Arnaud,* 78, rue Paul Bert, *Lyon,* ne povas daŭrigi sian korespadon pro gravaj motivoj. La k-doj bonvolu atendadi 6 monatojn, tiam li denove interrilatos. Bedaŭran saluton!

Germanio

K-do *G. H. Kroll,* Hennigsdorfer Str. 11, *Berlin N 65,* dez. koresp. pri ĉ. temoj seriozaj k. ĉ. l. gek-doj.

— K-do *Max Lühmann,* Reubekampstrasse 19, *Buer-Scholven i. W.,* serĉas koresp-antojn por siaj gekursanoj (40 infanoj, 11 ĝis 14 jaraĝaj) de senkonfesia lernejo. Resp. garantiata.

— K-do *Kurt Renner,* Töpferplan 9, *Halle a. S.,* pri ĉ. temoj, L, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Kurt Truppe,* An der Moritzkirche 5, *Halle a. S.,* pri ĉ. temoj. precipe pri sporto, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— Alsendu L. pri lab. kleriga mov. k. pri gravaj kulturaj okazintaĵoj en via lando. Germ. lab. kultura gaz. konsentis represi vian materialon. Certe resp. Adr.: *Willy Krey,* Mariannenstr. 77, II, *Leipzig O 28.*

— Gek-doj el ĉ. l. helpu al ni! Sendu salutojn okaze de nia LEA-distrikt-konferenco je la 17. k. 18. 7. 26. (Vidu "Senn." n-ro 34. pĝ. 6, sub *Glauchau i. S.*

— *Esp. Rondeto* dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l. Adr.: K-do *A. Schäfer,* Beethovenstr. 1, *Stuttgart.*

— K-do *K. Lehmann,* Tübinger Str. 85, *Stuttgart,* dez. koresp. kun filatelistoj ĉiul., interŝ. kaj aĉetas PM. Certe resp.

Hungario

Gesamideanoj dez. koresp. L, PK, PI, bfl. Adr.: *Stefano Bernath,* Varju-u. 21, *Kispest.*

Hispanio

K-do *M. Ramón,* Str. Peregil 15 ĝis 20, *Palma de Mallorca,* dez. interŝ. PM, k. ĉ. l., sendas PK kontraŭ PM. Mi ne sendas unue, sed ĉiam resp.

Jugoslavio

Atentu! Kiu k-do povus helpi al mi per mono (kiu estas rekompencata) por vojaĝi al Strasbourg, kie mi laboros. Malbonaj vivkondiĉoj devigas min elmigri. Adr.: K-do *Johano Wutte,* Mlinska u. 8, *Maribor.*

Sovet-Unio

K-dino *Lilia Sune,* str. Krasnij zorj, 73/75, kv. 33, *Leningrad,* dez. koresp. kun gejunularo ĉiul.

— K-do *R. Kopriva* (inĝeniero) Prospekt Karl Liebkneht, 63, kv. 15, *Leningrad,* dez. koresp. kun gek-doj ĉiul.

— *"Grupo de Junaj Pioniroj"* ĉe Klubo Starostin, *Odessa-Slobodka,* dez. koresp. kun pioniroj L, PI k. ĉ. l.

— *"Kolektivo de Kom. Junularo"* ĉe uzino "Elektrik" dez. koresp. kun komĉeloj aŭ a. jun. lab. org. k. ĉ. l. Adr.: Lopuĥinskaja, 8, *Leningrad.*

— K-do *Nikolao Vinogradov,* Internacionalnaja 47-2, *Penzo,* dez. koresp. pri div. temoj, L, PK, PI; tuj resp.

— K-dino *Marcenicena,* ul. Mizikeviĉa, 27, kv. 18, *Odessa,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-dino *Biĉek,* ul. Mizikeviĉa Klub Lenina, *Odessa,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-do *Sergej Polonin,* Melniĉnaj ul. 26, *Odessa,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-do *J. Ivanov,* Geofizika Instituto en Kuĉino, *st. Saltikovka,* Mosk.-Niĵego., ĵ., d., pri meteorologiaj k. sajsmologiaj temoj, L, PK k. ĉ. l.

— *Raboĉi Klub* (Laborista Klubo) im. Jonava, Kalanĉevska, pl. 1, *Moskvo,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

Presejo: UNS-PRODUKTIV-GENOSSENSCHAFT, LEIPZIG